Esperantista rondeto ĉe Uzinklubo ROH de Ekonomia entrepreno – Olomouc.
Esperantský kroužek při ZK-ROH Hospodářského podniku města Olomouc.

## JUBILEA LABORKONFERENCO EN OLOMOUC - ČSR

/ la 8-an de januaro 1956 /

La kunveno estis ekkomencita per ŝtata kaj esperantistaj himnoj. Post ili prezidanto de E-klubo Olomouc s-ano D-ro Mohapl bonvenigis ĉiujn partoprenintojn, speciale la eksterlandajn gastojn. Poste sekvis kulturenmetaĵo, kiun prezentis 9-jara s-anino Dobroslava Parůžková el Rýmařov. Plua programo estis referato de s-ano D-ro Mohapl pri la proesperanta agado en la regiono de Olomouc de post la unua esperantista konferenco en ĉi tui regiono en la jaro 1946. Pasintjara konferenco en Olomouc per ĉeesto de delegitoj de E-rondeto je el plej diversaj partoj de la ŝtato fariĝis jam malgranda tutŝtata kongreso, kion ankoraŭ akcentigis tiama propono krei TKKE-n, kion en la nomo de E-klubo en Olomouc esprimis ĝia vicprezidanto s-ano Miloš Rudolf. Ĉi tiu propono efaktiviĝis kaj estis dum la Tutŝtata konferenco en Otrokovice aprobita.
Poste parolis prezidanto de la komuna laborkomitato de E-rondetoj el regionoj Olomouc kaj Ostrava s-ano Slaný pri la laboro farita en la pasinta jaro.
Kiel plua sekvis referato de prezidanto de TKKE, s-ano Josef Vítek, kies vortoj donis novajn fortojn al ĉiuj ĉeestintoj.
Por jugoslavaj gastoj parolis s-ano Dobčnik, kiu esprimis koran saluton de la jugoslavaj esperantistoj kaj diris: „Ni devas konstati, ke la inter ŝtataj rilatoj pliboniĝas kaj ni povas kontribui al reciproka amikeco. En Jugoslavio ni atingis, ke Esperanto estas instruata kiel nedeviga objekto en la lernejoj. Al via konferenco mi deziras multajn sukcesojn kaj la saman al nia plua kunlaboro.“
S-ano Tvarožek raportis pri la tute malfavora situacio en Slovakio, kie la movado estas tute sen tradicio.
D-ro Mohapl tralegis poste saluttelegramon de s-ano Hromada kaj salutleterojn el Danlando kaj Děčín. Estis decidite sendi salutleterojn al JEF, s-ano T.Jung, D-ro Lapenna kaj telegramon al Sudano.
En diskuto parolis entute 19 gesamideanoj, inter ili s-ano Kilián / Třebíč /, kiu proponis pripensi eblecojn interŝanĝi por libertempo la infanojn eĉ plenkreskulojn inter Jugoslavio kaj ČSR, s-ano Lička / Ostrava / instigis al la porpaca laboro pere de Esperanto, s-ano Pečínka / Jeseník / raportis pri la E-rondeto en Jeseník, pri nova kurso por komencantoj kun 25 partoprenantoj kaj pri regula financa subteno, kiun la rondeto ĝuas, s-ano Kožený parolis pri sia agado kun Radio Praha pri renovigo de la Verda Stacio, pri gramodeskoj kun E-lingve kantitaj arioj el „Vendita fianĉino“ diris s-ano Rudolf, ke ilia fabrikado en granda serio dependas je decido de Ministerio de kulturo.
La konferencon malfermis s-ano Vítek, kiu dankis al aranĝantoj de la arta vespero kaj de a konferenco, kiuj estis modelaj. Li diris: Ni ne hezitu, sed laboru laŭ vortoj da Zamenhof, kiu en sia poemo La Vojo diras sekaj nin ne timigas la noktaj fantomoj, nek batoj de sorto, ĉar klara kaj rekta estas la voj´elektita!
Per komuna kantado de la Espero estas la konferenco finita.